

la progreso



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

Dr. JAN KOŘINEK,
profesoro de botanika fiziologio ĉe
Karlo-Universitato en Praha:

ESTONTAJ NATURSCIENCAJ INVENTAĴOJ.

Mi ne havas eĉ ideeton pri tio, kion oni en proksima estonto en naturscien-
coj inventos. Mi do diros orakolojn.
Kompreneble, sincere dirite, en tiu ĉi
fako eĉ orakoli ne eblas. Kara leganto,
kaj mi kun vi, ni devas kontentigi
kun io, kion oni povus nomi dua radiko
aŭ, se vi volas, dua derivacio de ora-
kolo; kaj eble eĉ tria derivacio.

Mi donos ekzemplon. En fino de la
dekoka jarcento E. Jenner trovis vakci-
non kontraŭ variolo. En tiu epoko bak-
teriologio estis en tiu evolua grado,
en kiu estas ĉe ni arbo dum fino de
februaro. Tiu vakcinado estas ilo tiom
efika, ke variolo ĉe ni praktike ne
ekzistas, kvankam antaŭe ĝi senpopo-
ligadis tutajn regionojn. Malgraŭ tio
estigas ĝin t. n. filtrita viruso, t. e. io,
kion neniu iam vidis, neniu bredis,
tia „être de raison“, kiel diras s-ro
Charles Roux, direktoro de Pasteura
instituto en Paris. Estiganto de tuber-
kulozo estas tia honesta bacilo, la stu-
dentoj kolorigas ĝin dum kvindek jaroj
en laboratoriaj ekzercoj, sed procento
de mortemo pro tuberkulozo estas daŭre
tioma, ke la ceteraj baciloj flavigas
por envio.

Mi eludas tiajn estontajn inventaĵojn,
kiuj efikus intensive je vivo de homaro.

La nefakulo rigardas la ceterajn sen-
signifaj, sed tute malprave. Sekretoj
de la naturo kunfandiĝis en malmolan
rokaĵon, kiun ni dispecigas per scienco.
Post iu frapo forfalas peceto granda,
iam nur eta, iam restas nur malgranda
fendaĵo, kiu kreskas post pluaj frapoj.

Unua serio de inventaĵoj celas al
forigo de distancoj sur la Tero. Post
kelkaj jardekoj perradie disaŭdigas Ĉi-
noj, Hindoj, Negroj, sed tiel, ke ĉiu
tion facile kaptos. Kaj ne sole la sonon,
sed ankaŭ la bildojn. Subkarpata Hu-
culo kaptos por si bildojn kaj kantojn
de sia tibeta sinjoro kolego. Reŭma-
tismaj avetoj el nia hejmo venigos sin
antaŭ la tagmanĝo per lua aviadilo
vaporumi siajn piedojn en sahara sablo.
Petola knabaĉo malkvietigos la panjon
tiom longe, ĝis ŝi montros al li, kiel
saltas efektiva aŭstralia kanguruo, kaj
ŝia mastrina moŝto ricevos invitilon por
gustumi lokustojn je la kvina sur monto
Kilimanĝaro... Mallonge: la inĝenieroj
diligentas; inĝenierarto, tio estas apli-
kita naturscienco.

Ĉio ĉi estas plejparte konata. Mi
tion aludas pro aliaj kaŭzoj. Mi per-
mesas al mi atentigi kolegojn filolo-
gojn, ke ili klopodu adaptigi al tiuj
aferoj. Ke ili paŝu iom kun ni kaj ke
ili ne tenu kapon turnatan je 180° pro
nura rigardaĉado en profundan estin-
ton. Mi volas adresi al ili ĝentilan
peton, ke ili faru por ni internacian
por ĉiu facilan lingvon, aŭ akceptu unu
el la ekzistantaj. Alimaniere tiu forigo
de distancoj neniom valoros por ni.

Neniam estis tiom malgranda la espero, kiom nun, ke iu el lingvoj vivantaj estos akceptita kiel internacia. Ne restas do ol fari lingvon artefaritan. Mi konsentas kun filologoj, ke ĝi estus sole siaspeca protezo. Ĉiu el ni havas en buŝo orajn kronetojn kaj preferas ilin al sendenteco. Kiel studanto de la sepa gimnazia klaso mi ellernis dum ses semajnoj la tiam laŭmodan esperanton tiom, ke mi en la Dresdena kongreso ĉiun komprenis kaj povis senĝene min amuzi. Per germana lingvo mi ne povis post la sepjara studado aĉeti eĉ kilogramon da pomoj, ĉar mi ne sciis, kio estas „fufciĝ feniche“. Mi rakontis pri tiu mia bona sperto pri esperanto al multaj filologoj, sed tiuj pruvis al mi, ke artefarita lingvo estas neebla, ke ne estas eble, ke mi komprenigis min. Kaj tia estis forto de iliaj argumentoj, ke mi fine kredis al ili kaj akceptis alian klarigon de tiu komprenigo, nome la Leibnizan antaŭe destinitan harmonion. Laŭ ĝi oni klarigos tiun aferon jene: Mi demandis iun je la deka, kiel li fartas. Li ne komprenis min, sed tamen li diris: Mi dankas, bone; ĉar jam depost eterneco estis destinite, ke li diros tiujn vortojn je la deka kaj du sekundoj. Al naciaj lingvoj ne estiĝus malutilo el tio, ankaŭ lirikaj poetoj ne estas devigataj timi pro sia modesta panpeco. Ĝi estus ilo helpa, kiu precipe bone servus al scienco kaj komerco. Ĝi estus tia senpretenda pario sen ambicio pro sia nobla deveno.

Poste estus vico da inventaĵoj hemiaj kaj biologiaj. Per transmutacio de elementoj eble oni sukcesos fabriki multekostajn metalojn per elspezo de groŝeto. Tio ne ŝajnus al mi tioma tragedio, kvankam mi tiajn aferojn ne komprenas eĉ iomete. Ŝajnas, ke la financministroj scias nutri sin kaj nin sen la ora standardo. Ĝi eble ne pasus sen malfacilaĵoj, sed oni versimile elpensus alian standardon. Pli katastrofajn sekvojn havus fabrikado de artefaritaj karbonhidratoj kaj proteinoj. Kion farus niaj terkulturistoj, se eĉ jam nun produktaĵoj de iliaj klopodoj estas senpagaĵ kaj nur per artifiĝa ĵonglado de revendistoj ricevas rimarkindajn prezojn. Mi ne volas aserti, ke tiu artefarita sintezo jam baldaŭ efektiviĝos, sed

estas certe, ke iam oni demandos en la foirejo: Sinjorina moŝto deziras bovaĵon bovan aŭ simple „sintezan“, kontraŭ kio la moŝto sinjorina en kvalito de sia kvalito protestos energie. Aŭ ni imagu tian tragedion, se al du konkurencaj sukeroj, la beta kaj kana venus ankoraŭ la tria — sukero aer-akva. Tiu beta kaj kana estas ankaŭ fakte aer-akvaj, ĉar la nomitaj florkreskaĵoj ĝin ankaŭ ne produktas el io alia ol el aero kaj akvo. Se tion povas tia beto, kial tion ne povus iam profesoro de bioĥemio. La ĝisnunaj provoj pri artefarita asimilo kompreneble finis provizore kun malsukceso. Cetere, se tio ne sukcesus, ni havas ankoraŭ genetikon. Oni komencos fari formojn alte grandfruktajn (tion oni jam iom sukcesas) kaj tiel sur kampoj kreskos kvintalaj terpomoj kaj kuros leporoj grandaj kiel bubaloj. Voronov havas ankaŭ sian metodon, ree alian, kaj per ĝi li ankaŭ volas fabriki ne superhomojn ĝis nun, sed almenaŭ superŝafojn.

En la scienca mondo estiĝus pro tiuj inventaĵoj granda ĝojo kaj triumfado imensa. La mondo vulgara plorus baldaŭ pro rezulto, ĉar konsekvenco de tiuj inventaĵoj estos ankoraŭ pliintensiĝo de la ekonomia krizo. Pluan akriĝon de la krizo alportos estontaj inventaĵoj bakteriologiaj. Ĝismatene povas esti inventita centprocente efikanta rimedo kontraŭ tuberkulozo, kancero, malario. Sole en brita Hindujo mortas pro malario unu miliono da homoj po-jare kaj la dua miliono pro pesto kaj ĥolero. Juĝu kiom la homaro estus kreskinta, se tiuj homoj ne estus mortintaj kaj estus havintaj eblon multiĝi. Ni ne scias konsilon, kion fari kun la ekzistanta homaro. Laŭ nuna tempo rezonante estas certe, ke multiĝado de homaro signifas multiĝadon de senlaboreco kaj mizero.

Tiuj hemiaj inventaĵoj, kiujn mi aludis, ne estas tiom aktualaj; la sintezo, kiu estus profitdona, ne venos tiom rapide. Tiuj bakteriologiaj venos antaŭe. Ni havas jam belajn sukcesojn. Du malsanoj estis jam preskaŭ plene ekstermitaj; kiel estis jam dirite: variolo kaj rabio. Gravan baton ricevis differio kaj malario. La sovaĝuloj multiĝas sen-

bride kaj tamen ne kreskas ilia nombro. Naskiĝo de malgranda Eŭropaneto estas rezulto de longaj konsiliĝoj kaj matematikaj kalkuloj kaj tamen la popolaro eŭropa miriĝe kreskas. Ĉio ĉi estas rezulto de higienaj aranĝoj. Cetere ĉe tiaj biologiaj eltrovaĵoj ni ne devas timi la superterpomojn kaj superbovidojn de la malproksima estonteco. Ĉiu finbredado de raso pli produktema aŭ pli rezista kontraŭ malsano, havas kiel sekvon grandiĝon de hiperproduktado kaj kun ĝi mano en mano irantan ekonomian krizon.

Kaj kion oni devas fari kontraŭ ĉiuj tiuj malfacilaĵoj? Per kalumniado pri personoj, partioj, klasoj, nacioj ĝi ne marŝos. Tio sufiĉas sole por amuzado kaj konversacia materialo de ĉirkaŭtabla societo. Kaj haltigi progreson de la scienco, ĝi estus paŝo kontraŭ la naturo. Cetere ĝi estas neefektivigebla. Kiu povas malpermesi al bolŝevikoj ilian kvinjaran planon aŭ almenaŭ tiujn ĝiajn metodojn? Unue ili tiujn fabrikejojn bezonas, kaj poste tiu vorto estas narkotilo por kelkaj milionoj da homoj.

Paul Morand skribas, ke li vidis detruon intence imensajn provizojn de kafo. Tio estas ja terura paradoksaĵo, ĉar estas milionoj da homoj, kiuj ne povas aĉeti eĉ grajneton el tiu ĉi kafo destinita por detruo. Sociologio, mi parolas pri la honesta scienco, ne sukcesis marŝi kun la naturscienco. Da valoroj estas superfluo kaj temas sole pri ĝusta distribuo. Ĝin devas elpensi la sociologiaj fakuloj. Estus bone, se ili pli rapidus por atingi siajn natursciencajn kolegojn. Kaj tasko de ni ceteraj estas, ke ni laŭeble limiĝu hiperproduktadon de la galo, laŭ kiu ni ĉeĥoj certe estras inter la ceteraj nacioj.

El „Národní listy“ (22. I. 1932) tradukis
Dr. Stan. Kamaryt.

Variolo = černé neštovice. Vakcino = očkování. Kanguruo = klokan. Kvintalo = metrák, Bubalo = búvol, Galo = žluč. Lokusto = kobylika.

Máte již Filipův slovník esp.-český?

Brož. za 40 Kč, váz. za 50 Kč.

JULIO BAGHY:

AL VENKO!

Jen granda tag'
flirtas la flag',
ŝvelas la brustojn nova sento.
Triumfa kant'
de Esperant'
eĥas miloble tra l' silento.
Ĝojrozo pompas sur la vang',
aklame kantas ĉiu lang':
„Al venko! Al venko!
Al fina glora venk'!“

Jen verda stel'
lumas al cel'.
Vojon ĝi montras al homaro.
Pro sankta flam'
mortos malam',
falos en polvon ĉiu baro.
Ĝi kreas por eterna glor'
la novan mondon en la kor'.
„Al venko! Al venko!
Al fina glora venk'!“

Homama ver'
regos sur ter'.
Bonon alportos nia peno.
Post vivofin'
sekvos ja nin
de la homaro — danka beno.
Libere flirtu verda flag',
proksime estas jam la tag'
„Al venko! Al venko!
Al fina glora venk'!“

El „Pilgrimo“.

JULIO BAGHY:

POST STRIKO.

„Ĉu estas vero, kiun ŝajno maskis?
Venkitaj estas vi. Jen via gloro:
humile nun reveni al laboro
kaj scii tion, ke la strik' fiaskis“.

„Venkitaj estas ni — vi prave diris,
Ĉi fanfarono indas al sinjoro.
Por vero ni forsangis, ne por gloro
kaj al batal' ni jam venkife iris.“

Ĉar senarmile luktis la korpuso,
dum vin la luksobastion' defendis.
La vero vivas, nur la korpon venkis
stomak' malsata, ve' de l' infanbuŝo.

El „Pilgrimo“.

JARMILA HAŠKOVA:

NOTOJ DE PROFESORO.

Septembro 1911. Oni donis al mi la unuan klason. Tridek brunaj kapetoj, du blondaj kaj unu ruĝa. Sesdekse puraj okuloj sekvas ĉiun mian movon, ĉiun mian rigardon. Mi sentas plenan pezon de mia respondeco, sed mi ne timas. Mi estas juna, mi estas forta kaj scias, ke mi estas kapabla gvidi miajn lernantojn per forta kaj afabla mano. Mi rigardas ilin kaj mi pensas, kio estos el Vi, nubmiena, silentema knabeto, ĉiam enreva kaj enpenza? Kia estos Via profesio, ruĝhara Aŝa, rigardanta en la mondon per okuloj, nekonantaj timon? Kaj Vi, buklohara knabeto, moviĝema kiel hidrargo kaj senĉese ridetanta? Miaj oraj knaboj, mi vin amas, mi volas esti por vi instruisto, amiko, patro.

Septembro 1912. Kaj denove en laboron. Mi ĝojas je miaj buboj, ili estas sovaĝuloj, sed entute dirite, ili ne estas la plej malbonaj. Kaj ankaŭ tiu ruĝhara Aŝa estas post la ferioj iom pli kvieta. Motl tuj en la unua leciono ne estis atentema, kaj li rigardas ien en angulon kiel sanktulo. Mi devas lin iom vigligi, por ke li ne dormu. Plej bone estos, se mi sidigos lin apud la buklohara Danda. Tiun knabon ĉiuj diabloj maltrankviligas kaj diablo ŝuldis lin al mi. Mi devas tiun ĉi jaron tuj de komenco esti pli severa, per boneco oni multon ne atingos.

Septembro 1913. Vidu, jam la tria klaso. Mi eĉ ektimis kiel tiuj stratbuboj dum la ferioj plikreskis. Mi havas ilin denove ĉiujn tridektri. Rigardas ili kiel ribelantoj kaj kriegas kiel bestoj. Mi havas denove idioteton Motl, tiun alenon¹⁾ Danda kaj ruĝharulon Aŝa, kiu jam aspektas kiel estro de sovaĝa tribo Terentete. Nenia helpo, mi devas esti severa, alie mi ne sukcesos. Oni diras, ke pli multe helpas afabla vorto ol perforto, sed mi pensas, ke tio ne estas vera. Aŝa estas tiel aroganta, ke mi eĉ ne kuragas lin alparoli afable. La bubo min certe mokridas. Sed ta-

men, vi stratbuboj estas tro malfortaj kontraŭ mi.

Septembro 1914. Mi tamen havas la kvaran klason. Mi petis, ke oni donu al mi la unuan, sed kompreneble, la unuan prenis al si la direktoro mem. Tio estas laboro! Tiuj buboj estas ĉiam pli malbonaj. Ili estas vere bestaro. Tuj en la unua leciono mi ekpikis vaton en la inkujo kaj sur la seĝo mi trovis desegnan najleton, pinton supren. Mi vefas, ke tion faris tiu hipokritulo Motl. Li sidas sen moveto kaj rigardas „kiel bovido vidanta novan pordegon“, sed mi juras, ke tio faris li kaj neniu alia. Tiun ruĝharan knabegon mi enskribis en la klaslibron, ĉar li abomene ridegis, kiam mi alparolis la studentojn per afabla invito, ke ni estu bonaj kamaradoj. Ankaŭ Danda preskaŭ estus aperinta en la klaslibro. Li vendis dum la paŭzo cigaredojn kaj savis lin de la enskribo sole hazardo. Nome mi forgesis hejme cigaredojn kaj mi devas aĉeti de Danda. La buboj kaŝe malice ridetis kaj puŝetis per kubutoj. Knabetoj, mi tion vidis kaj ne timu, mi ne restos via ŝuldanto!

Septembro 1915. Mi havas en la kvina kvardek lernantojn. Ni premiĝas en malgranda lernoĉambro, ĉar la unuan etaĝon de la konstruaĵo oni okupis. Tiun ĉi jaron estos malbona laboro; duono de la kolegoj militas kaj mi mem apenaŭ evitis rekrutigon. La buboj estas iel distritaj kaj ŝajnas al mi, ke eĉ tiuj malgrandaj petolaĵoj, en kiuj ili foruzas sian energion ne venas el ilia koro. Motl estas enpensiginta, li legas sub la benko informojn el la batalejo. Li havas tie la patron, kompatindulo. La ruĝhara Aŝa faras nepatriotajn spritaĵojn kaj se mi estus interne nigroflava.²⁾ kiel mi devas esti supre, longe li jam pendus. La buklohara Danda estas gaja, kiel antaŭe. Mi trafis lin ĉe marĉandado. Tio estas malbona komenco de la lerneja jaro, sed mi kredas, ke tio ne daŭros longe. La paco estas proksima. Atendu, buboj, revenos al vi denove la malnovaj bonaj tempoj.

Septembro 1916. La ferioj pasis, kaj la milito daŭras. La buboj estas ne satmanĝintaj, en vestoj foruzitaj,

1) viglulo, maltrankvilulo.

2) aŭstria patrioto.

mi kompatas ilin. Ili estas plenaj da politiko. Ni harmonias jam iom pli bone ol antaŭe, ĉar iliaj langetoj ne mokas plu min, sed la personojn starantajn multe pli supre. Mi aŭdis kiel la ruĝhara Aŝa diris al Motl: „Nia klasprofesoro estas bona viro, kompreneble li ne povas debati kun ni, sed li estas nia homo. Ni povas danki al Dio, ke ni lin havas.“ Danda prizorgis por mi kvin kilogramojn da faruno. Motl ne plaĉas al mi. Senĉese li ion kopias, skribas, skribas kaj poste tio iras el mano al mano, iaj propagandiloj.³⁾ mi ne scias kion fari. Se mi tion ne vidas, mi lasas en danĝero iun naivan bubon, kiu tion montros en neĝusta loko. Se mi tion vidos, mi estas kunkulpulo, se mi ne intervenus kaj Dio! kiel rezultus la disciplina procedo? Eble iel alude atentigi la knabojn, ke ĉiu papereto estas ŝtupo al pendigilo. Eble dum historia leciono, iel lerte.

Septembro 1917. Ĉagrena revido. Motl ekdormas dum la instruado, li estas malsata kiel lupoj. Iam estas al mi eĉ amare, kiam ekz. mi hazarde trovas vafon en inkujo. Miaj oraj knaboj, ĉu vi pensas, ke tio min kolerigos hodiaŭ? Mi ĝojas, se vi interbatalas, brufermas la pordon kaj kriegas. Vi forgesas, ke vi malsatas, vi forgesas, ke vi havas en la batalkampo la patron aŭ fraton, vi forgesas, ke vi mem post nelonge iros sub la mezuron.⁴⁾ Kaj tri eble jam tiun ĉi jaron. Motl, Danda kaj Aŝa; tiaj infanoj! Aŝa estas ja decidpreta, kuraĝa kaj forta, sed tiu buklohara Danda, la ĝaja knabo, plena da ŝercoj kaj kantoj, karesinfano, al kiu servitino alportas la antaŭtagmezan manĝon, se li ĝin forgesas. Motl-on oni ne soldatigos, li estas osto kaj haŭto, kompatindulo.

Septembro 1918. Ni komencis. Mi preskaŭ ploris, kiam mi legis la nomojn. Mi rigardas tra la lernoĉambroj kaj mi vidas ankaŭ la forestantajn. Tie sidadis la revoplana Motl, tie Danda, tie Aŝa. Vacák kuŝas en malsanulejo kaj Tuma revenis kiel invalido. Li lernas skribi per la maldekstra mano, sur la dekstra li ne havas fingrojn.

3) kontraŭ la milito,

4) al rekrutigo.

Oni diras, ke la kompatan servon faris al li kamarado Aŝa. Danda servas en Praha. Li alportas al mi farunon. Tiu bubo prizorgas ĉion kaj li estas lerta en ĉia situacio. Li eble sukcesos resti tie. Motl estas malaperinta. Vacák diras, ke li falis,⁵⁾ sed Tuma ne kredas tion. Dio donu feliĉon al Vi, fileto. Vere mi iam preĝas.

Septembro 1919. Mi havas la unuan klason. Tridek paroj da okuloj rigardas min tro saĝe kaj timeme. Tio ne estas mia antaŭa unua klaso. Ho, tio estis knaboj kiel „sango kaj lakto“ kaj eĉ vejneto ne estis bona sur ili. Kiom min kolerigis Danda, ekscitadis Aŝa. Tiu estis jam tiam kuraĝa, li ne timis eĉ diablon, mia ora heroo, li mortis, laŭdire, bele, sentime. Oni diras, ke liaj ruĝaj haroj brilis sur la pendigilo en suno, kiel aŭreolo.⁶⁾ Kaj Motl mortis revenante hejmen semajnon post la ŝtata renverso. Li atingis nur Salcburĝon, ricevis gripon kaj al la patrino li ne plu revenis. Tio estis knaboj, karuloj, herooj, kompatinduloj. Mi rigardas la tridek knabetojn antaŭ mi. Knaboj, kio fariĝos el vi? Vi estas palaj, vi scias jam tro multe pri la vivo. Mi vidos vin kreski, plenkreski — sed ne, vi infanoj orharaj, nur ne morti sur pendigilo, malproksime de la patri-no sur la vojo hejmen.

Septembro 1920. Mi pensas, ke ni jam iom rekonsciigis, tiu ĉi jaro estos pli ĝoja, la okuloj de la buboj brilas, dank' al Dio, mi vidas denove infanojn. Petolu, interbatiĝu, ĵetu ŝtonojn, donu al mi vafon en inkujon/forrompu ĉiujn piedojn de mia seĝo.

Septembro 1921. Do jam tria klaso. Rigardas ili min kiel rabistoj. Mi diras i li estas krimuloj: skurĝo al vi kanajlaro! Alvenis nova lernanto. Ruĝhara, aroganta. Elmetis langon kontraŭ mi dum la paŭzo. Mi kaptis lin kolome, mi eltiris lin el la benko kaj ekkriegis: „Kiel Vi nomiĝas?“ „Rákosnik“. Mi lasis lin, ektremis kaj rigardis en liajn okulojn, kiuj rigardis min rekte kaj kuraĝe.

5) mortigita en batalo.

6) se Ĉeĥoslovakio batalinta en la legioj kontraŭ Aŭstrio estis militkaptita de aŭstrianoj, li estis pendigita,

„Ĉu Vi havis fraton Aŝa?“ Liaj okuloj pleniĝis de larmoj, ankaŭ la miaj. Mi kisis lin kaj mi amas lin. Ne, knaboj, vi ne estas rabistoj, kanajlaro nek krimuloj, vi estas fratoj de herooj, filoj de herooj, filoj de martirinoj. Mi volas esti al vi instruisto, amiko, patro.

Trad. M. Z.

Angla kristnaska kanto verkita laŭ ĉefa leĝendo. Dum kristnaskaj festotagoj oni kantas en Anglujo kanton, kies spirita bazo devas esti serĉata en Bohemio. La estiĝo de tiu ĉi angla kristnaska kanto estas por ni tre interesa, sed malgraŭ tio ĉe ni proporcie nur malmulte konata. La kanto estas nomata „La bona reĝo Venceslao“ kaj rilatas al la Sankta Venceslao, ĉefa princo-Guste antaŭ tridek jaroj pruvis D-ro Kalousek en „La revuo de muzeo de la ĉefa reĝlando“, kiel ĉi tiu kanto disvastiĝis en Anglujo. La kanton verkis angla pastro John Mason Neale, vivinta en jaroj 1818—1866; kun lia nomo ĝi estas presata en kolektoj de anglaj kristnaskaj kantoj. Neal prilaboris leĝendon de V. A. Svoboda „Sanct Venceslaw Podiwin“ eldonitan en Praha en la jaro 1847. La poemo, al kiu komponis pli poste melodion kapelestro Thomas Helmore, naciigis en Anglujo kaj hodiaŭ kantas ĝin dum kristnaskaj festotagoj la tuta angla mondo. La verkisto Kipling mencias ĉi tiun kanton je la fino de sia rakonto „William the Conqueror“. La unua strofo de la kanto tekstas en prozo:

Dum la festotago de Sankta Stefano, kiam per neĝoblovaĵoj estis kovregitaj vojoj, kampoj kaj kabanoj, la reĝo Venceslao rigardis tra fenestro. La luno surverŝis per sia klara brilo frostrigidadajn kampojn kaj lumis al maljunulo kolektanta ĉi tie lignon.

„rr“ en „Národní Osvobození“.

Trad. J. Rebiček.

Kiel ni instruas en la j. 1931—32. En mezlernejoj ni instruas al infanoj en la unua klaso pri goriloj, kvankam la infanoj neniam vidos ilin kaj 90 procentoj de la maturaj intelektuloj-nefakuloj ne scias, kie ili havas apendicon. Pri la homo la lernantoj scias nenion.

Ni instruas al duaklasanoj, ke en Ĉerepanĝo alpluas 12 metroj da akvo jare, sed neniu el tiuj infanoj vidis ankoraŭ, kiel aspektas la aparato, per kiu oni mezuras la kvanton de la terfaliintaj akvaĵoj atmosferaj.

Ni instruas kiam, kiu kaj kiel famiĝis per mortigado de t. n. malamikoj, sed ni ne scias, kiam kaj kiel iu helpis por mallongigi la distancojn sur la tero kaj kiu plej multe plifaciligis

la reciprokajn rilatojn de la homoj. Ni instruas, kiel alta estas tiu aŭ iu monto, sed ni estas tute sen intereso pri tio, kiom da aŭtomobiloj aŭ telefonoj apartenas meznombro al 100 homoj, kvankam tio dirus al ni pri homoj kaj ŝtatoj multe pli. (El „Zijeme 1932.“ Nro 10.)

EL ESPERANTO-MONDO

Aranĝoj en Praha antaŭ Pariza kongreso.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kun esperantistoj de Praha aranĝos akcepton por kongresanoj veturantaj al Parizo tra Praha. Ĉar el Praha estas projektata speciala vagonaro por ege rabatita prezo, ni esperas, ke tra Praha veturos ne nur ĉsl. esperantistoj el lokoj oriente de Praha, sed ankaŭ multaj samideanoj eksterlandaj: el Pollando, Rumanio, Hungario kaj landoj baltaj. Detaloj sekvos. os.

Per nova oficiala cirkulero la greka ministro de instruado rekomendas al la lernejoj inspektoroj faciligi instruadon de esperanto en la lernejoj „pro la graveco, kiun ĉiutage akiras en la civilizita mondo la internacia lingvo esperanto.“

Se vi hazarde estus vidinta la filmaktualaĵon, en kiu Mahatma Gandhi faras paroladon al Ĝenevanoj, vi estus rimarkinta viglan personon, kiu tradukas franclingve la anglalingvan paroladon de Gandhi. Tiu ĉi tradukisto estas neniu alia ol Edmond Privat.

Dro Privat kun sia edzino akompanis Gandhi'n al Indio. Cefartikolon por febr. N-ro. de „Esperanto“ li skribis en Delhi.

La gazeto „Vegetarano“, oficiala organo de la Vegetara Ligo Esp. en sia 4. n-ro alportas en esperanto la paroladon de Dro Alexander Sommer-Bafek: „La vegetarismo en la ĉiutaga vivo“. Tiu parolado estis prezentita dum la 7-a Internacia kongreso de Vegetaranoj.

Inter honoraj profektantoj de la Internacia Medicina Revuo troviĝas ankaŭ ĉsl. universitataj profesoroj Dr. Kadlícký kaj Ostrčil. Inter ĝiaj kunlaborantoj el ĈSR: Dro Austerlitz (Bardiov), Dro Bischitzky (Praha), Dro Parma (Praha) kaj Dro Ulman (Mukačevo).

La Interligilo de I. P. T. T., centra organo de fakinformoj pri Poŝto, Telefonio kaj Telegrafio, aperanta en Parizo, alportas en preskaŭ ĉiu numero kunlaboraĵojn de S-ro

slova je nadchla). Ili entuziasmiĝis per liaj vortoj (nadchli se jeho slovy).

Estri býti pánem nad něčím, ovládati něco, vládnouti něčím: Estri firmon, estri lingvon.

Fasoni dáti (oděvu) formu, způsob: elegante fasonita robo; laŭmode fasonita vesto.

Fiam i planouti: lia vizaĝo ekflamis pro honto; ribelo subite ekflamis (vzplála).

Pokračovati v této řadě na základě Fundamenta a SAT-vortaro (z něhož většinou jsou voleny naše věty) by byla práce velmi zajímavá a užitečná. Prospělo by se tím i přílišnému slovníku, event. druhému vydání slovníku Filipova. Kdo má o věc zájem, račiž nám napsati. Hmd.

JA

Príslovce JA překládáme do češtiny různými způsoby:

1. Slovy: sice, ovšem, pravda, arci, tak jak o tom promluveno v článku „SICE“.

2. Slovy: v ž d y t, p ř e c e. Na př.: *Mi ja diris tlon al vi!* = Vždyť jsem ti to říkal = Přece jsem ti to řekl (přízvuk na „řekl“; „přece“ zde nemá přízvuku). *Tlon mi ja ne diris!* = To jsem přece neřekl! (Opět nepřizvučné „přece“).

Slůvkem „ja“ poukazujeme zde na známou, zřejmou, očividnou skutečnost. Často je v něm obsažena výčitka: *Mi ja diris al vi, ke vi venu precize!* = Řekl jsem ti přece, abys přišel přesně. (Často: „vždyť přece“: Vždyť přece jsem ti řekl, abys...)

Jiný příklad: (Tio estas tro kosta.) *Ĝi estas ja unuaranga produktaĵo!* (Zákazník: To je příliš drahé. Prodavač: Vždyť je to přece prvotřídní výrobek!)

Ŭhrnem:

ja = sice, ovšem, pravda, arci, vždyť, přece.

PŘECE.

1. Nepřizvučné „p ř e c e“ = ja: viz pojednání JA, odst. 2.

1. přizvučné „p ř e c e“ = t a m e n; má význam „přes to“, „vzdor tomu“, „nicméně“, esperantsky „malgraŭ tio“, „spite tio“.

Kvankam li estas riĉa, tamen li ne estas feliĉa = Ačkoliv je bohat, přece není šťasten.

Mi venos, se tamen mia febro foriĝos — Přijdu, jestliže moje horečka přece zmizí (tamen = malgraŭ mia timo, ke ĝi daŭros).

Li multe ofendis ilin, tamen ili pardonis lin = Velice je urazil, nicméně mu odpustili.

„Tamen“ uvádí hlavní větu, na níž závisí vedlejší věta začínající „kvankam“: Kvankam ni perdís multon, tamen ni eltenos. Viz další takové věty na konci pojednání SICE.

„Tamen“ někdy zesiluje spojku „sed“:

Kiomfoje mi avertis, sed tamen li ne obeis = Kolikrát (= cokrát) jsem ho varoval, ale přece neposlechl.

Vždyť (= přece) jsem tě mnohokrát varoval, ale tys přece neposlechl = Mi ĵa avertis vin multe, sed vi tamen ne obeis. Hmd.

Masaryk-numero.

Okaze de la 82-a naskiĝtago de nia prezidento T. G. Masaryk ni volonte sendos senpage al niaj novaj abonantoj la specialan marfan numeron de la jarkolekto 1930, kies enhavo estis dediĉata al nia prezidento ĉe la okazo de liaj 80 jaroj.

Redakční sdělení.

Prvé číslo v nové úpravě a s bohatým obsahem bylo radostně přijato nejen dosavadními odběrateli, ale i těmi, jimž jsme je zasílali na ukázkou. Míle nás potěšila řada dopisů, jež nás došla. Děkujeme všem za projevy povzbuzení.

Doufáme, že stejnou pozornost věnují naši přátelé i číslu druhému a třetímu, jež vydáváme společně vzhledem k obsáhlým zprávám Svazovým v Bultenu. Nadále se dvojčísel pokud možno vyvarujeme. Naši čtenáři si zajisté povšimnou, že vyšlo dosud 36 stránek, což se rovná třem číslům (leden, únor, březen) po 12. str.

Diversa.

De Brno. Sendinto de la poemo „Rememoroj“ estas petata informi nin pri sia adreso, aŭ sendi almenaŭ la originalan tekston.

Al Plzeň. Ĉu iu povas nin informi pri la nuna adreso de F-ino Hedvika Vlčeková, antaŭe en Kolárova, 5? Koran dankon antaŭe!

S-ro V. Pražák Kosmonosy. Vaše předplatné na rok 1932 došlo správně.

Naše soutěž. Výsledek naší soutěže, kterou jsme vypsali v roce 1928, bude uveřejněn v příštím čísle, t. j. dubnovém, v němž též začneme uveřejňovat práce cenami poctěné. Děkujeme všem účastníkům za trpělivost. Těšíme se, že konečně budeme moci naši čtenářskou obec seznámiti s jejich pracemi. V dnešním čísle uveřejňujeme práci Notoj de profesoro, jež překladatelem byla přihlášena mimo soutěž.

Korekto. En la artikolo „Eĥoj de la ĝeneva lingvistika kongreso“ (paĝoj 1—3) streku kelkloke en la nomo de prof. Jespersen erare kompostitan n post r.

Por rompi la kapon. Solvon de la demando sur p. 7. sendis al ni S-roj J. Baculík el Zvolenská Slatina, Jos. Mňačko el Tišnov kaj P. Šlechta el Smolence. Kiam la dormanto vekigis, li aŭdis la lastan baton de la dekdua horo.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA II. STÁRKOVA 4.
NUMERO 43. - MARTO 1932.

Invito al la

XIII. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista okazonta en Praha

dimanĉon, la 20-an de marto 1932 je
la 8-a horo matena en kafejo Louvre,
Národní tř. 20. I. etaĝo.

Programo:

1. Protokolo de la lasta ĝen. kunveno.
2. Raportoj pri la agado kaj pri la kaso.
3. Raporto de la revizoroj.
4. Asocia organo.
5. Elektaj por vakiĝintaj lokoj komitatataj.
6. Liberaj proponoj. (Sendotaj ĝis la tria tago antaŭ la kunveno.)

La komitato:

Ni petas niajn membrojn, ke ili bonvolu veni plej grandnombre. Ĉar la raportoj pri la agado estas enpresitaj en la Bulteno, kiun ni sendiĝis al ĉiuj membroj, ankaŭ al neabonantoj de la Progreso, la kunveno verŝajne ne insistos ĝin legi. Tiamaniere restos pli da tempo por amika kaj ĝojiga diskuto pri farito kaj faroto. — Denove ni atentigas pri la § 16-a de la statuto, laŭ kiu membroj ne povantaj ĉeesti persone povas reprezentigi sin per iu ĉeestanto. — Same ni atentigas pri la § 17-a, laŭ kiu la kunveno estas decidrajta, se partoprenas almenaŭ kvarono de la membroj (persone aŭ reprezente). Se ne kunvenis tiu nombro, okazas post unu horo nova kunveno, kiu estas decidrajta sen atento de la nombro.

Niaj membroj bonvolu atenti en la Raporto pri agado, ke liberaj proponoj el la lasta ĝenerala kunveno, de kiuj realigo dependis de la komitata kunveno, estis plenumitaj, escepte unu efektivigata, ĉiuj. Tiu ĉi fakto estu instigilo al niaj kunlaborantoj veni tiun ĉi jaron kun pluj efektiveblaj proponoj.

Konsideru eblan uzon de la Foira rabato! Sabate vespere vi trovos esp-istojn en „Louvre“.

AGADO DE ĈAE EN JARO 1931.

Raporto por la XIII. ĝenerala kunveno okazonta
20. III. 1932.

Ankaŭ tiun ĉi jaron ni sekvas aranĝon de la jaro pasinta, kiu trovis ĝeneralan aprobon kaj ni raportas pri la agado asocia en komuna raporto de la komitato verkita de la prezidanto laŭ partaj raportoj de la komitatanoj. Pri komitata agado aperis detalaj raportoj en la Bulteno; (tial la raporto povas esti konciza kaj revoki sin je paĝoj de tiu ĉi revuo, kion ĝi ofte faras (se oni ne diras ion alian, la indikataj paĝoj koncernas XIIIan jarkolekton de la Progreso.) El la raporto estas videbla unu fakto tre ĝojiga; granda disvolviĝo de la asocia agado kaj el tio sekvinta grava vigliĝo de la movado en la tuta respubliko. Dume ni aŭdas ĉiuloke plendojn pri la krizo, en nia movado krizo nun ne plu estas. La jaro 1931 signifas tiom rapidan disvolvcon de la movado en nia lando, ke tioma vigleco ne ekzistis jam dum longa tempo. La graveco de la movado atentinde plifirmiĝis. La ekfloro komencis en jaro 1930 kaj dum la jaro 1931 disvolviĝis. Tiu ĉi progreso de nia afero estas ŝuldata ne sole al la asocia komitato, sed ankaŭ al multaj niaj kunlaborantoj, iam konataj, ofte nekonataj. Al ili ĉiuj apartenas tre sincera kaj tre granda danko. La rezultoj akiritaj donas al ni novajn devojn, el kiuj la plej ĉefa, sed ankaŭ la plej malfacila estas persisti. Ni promesu al ni ĉiuj sub influo de tiuj ĉi esperigaj konstatoj, ke ni persistos. La laboro asocia estis ĝojiga ankaŭ pro la granda harmonio, kiu daŭris inter ĉiuj kunlaborantoj.

Neagrable estis sole la sperto, ke ankaŭ la pasintan jaron, kiel ĉiam, kiam la movado ekfloras, ekstaris homoj apartiĝemaj, kiuj anstataŭ kunlabori en ordiĝita trupo, staras aparte kaj kiam vidas la maturiĝantan frukton de la organizita laboro, ili kuras, forŝiras ĝin, jam eĉ nematuran, kaj poste rikanante fanfaronas, ke estas ilia rikolto, kiu elkreskis kontraŭ aŭ almenaŭ sen la atento de disciplinitaj laborantoj. Ni ne koleras je ili. Tiaj homoj estas ĉie kaj en ĉiuj movadoj. Sed oni ne postulu de ni, ke ni dediĉu tro da tempo kaj tro da laboro, kiujn ni uzas por la movado kaj kiuj daŭre mankas al ni, al agado de tiuj apartiĝemuloj.

Kaj ni finu tiun ĉi kvazaŭ antaŭparolon per la peto al la leganto, ke li legu la sekvantan raporton atente ĝis la fino. La raporto estas konciza. Eble la leganto trovos, ke io estis farenda alimaniere. Li bonvolu tion diri al ni. Kaj permesu al ni ankoraŭ konstati, ke ĉiuj liberaj proponoj akceptitaj en la lasta ĝenerala estis plenumitaj escepte eldonon de la lernilo por la ekzamenaj kandidatoj; sed ankaŭ ĝi estas preparata.

1. Konsisto de la komitato. En la ĝenerala kunveno estis plenigitaj laŭstatute vakiĝintaj lokoj en la komitato. La rezultinta listo estas sur p. 47. La unua komitata kunveno longe diskutis pri divido de la funkcioj, sed fine restis la divido kiel en la jaro antaŭa jene: prez. Kamaryt, vicprez. Dr. Pitlik, ĝen. sekr. Hromada, I. sekretario Ginz, II. sekr. Tarantíková, kasisto Sklenčka.

En letero de la 26. X. s-ro Hromada rezignis je funkcio de la ĝen. sekretario pro troa okupiteco en sia profesio kaj pro bezono dediĉi sin al la gazeto kaj al la komencitaj esperantaj laboroj. La komitato decidis ne akcepti la rezignon kaj peti s-ron Hromada resti en la funkcio; nur post lia denova peto, ke li estu senigita de ŝarĝo de la funkcio, kiun li portis tiom longe, la komitato la 15. XII. la rezignon akceptis. La danko letero de la prezidanto al s-ro Hromada estis legita en la kunveno kaj publikigita en Bulteno p. 108. Sed ankaŭ sur tiu ĉi loko estas nia devo danki publike al samideano Hromada pro persistemo kaj laboremo, kiujn li montris en funkcio de la ĝenerala sekretario dum tiom longa tempo. Li akceptis ĝin la 2-an de februaro 1920.

Funkcion de ĝen. sekretario akceptis post ĉiuvoĉa baloto s-ro Ginz, kiu jam antaŭe plenumadis ĝin. Funkcio de I-a sekretario restis vakanta. Estas rimarkinde, ke en la listo de la komitato elirinta el la balotado en la ĝenerala kunveno okazis eĉ ne unu malakcepto, kio estas unuan fojon post pluraj jaroj.

2. Komitataj kunvenoj okazis 8, el kiuj prezidis 6 Dro Pitlik, po unu Hromada kaj Ginz. Ankaŭ tiun ĉi jaron estis ĉeesto de komitatanoj tre kontentiga kaj ĉiam ili kunvenis en nombro laŭstatute decidpova. Ankaŭ la ekster-prahaj anoj kunlaboris diversmaniere; de la prezidanto venis por ĉiu kunveno informoj kaj proponoj. La protokoloj de la kunvenoj estis sendataj en kopioj al la neĉeestintaj anoj kaj detalaj partoj el ili estis publikigitaj en la Bulteno. La deziro, ke por skribado, kopiado kaj dissendado de la protokoloj dediĉu sin unu komitatano, ne plenumiĝis ankaŭ en tiu ĉi jaro.

Protokolojn verkis Tarantíková, Ginz, Hromada, Slavík. Tamen en la lasta tempo vidiĝas pliboniĝo; la II-a sekretariino konsentis akcepti tiun laboron kiel daŭran funkcion. Ni esperas, ke tiu pliboniĝo estas daŭra kaj ke ĝi signifos gravan sensarĝigon de la ceteraj funkciuloj.

3. Membra kunveno okazis unu, en Brno 8. XI. 1931, raporto pri ĝi estas sur p. 94.

4. Administrado. En la pasinta jaro restis divido de la taskoj laŭ la ekzistantaj komisionoj kun la estroj de la jaro antaŭa. Administrado de membroj (Sklenčka), Financaj aferoj (Sklenčka) Lernejoj (Kamaryt), Gazetara servo (Ginz), Radio (Ginz), Turismo (Pitlik), Sciencistaj aferoj (Kamaryt), Literaturo (Hromada), Ekspozicia materialo (Sustr).

Krom la komisionoj funkciis Studenta sekcio kreita en la lasta ĝenerala kunveno; estris ĝin s-ro Vlast. Sedláček, studento de komerea altlernejo, kiu reprezentis ĝin en la komitato, kiel ĝia plenrajta ano. Bedaŭrinde ankaŭ tiun ĉi jaron ni devas plendi, ke plejparte la laborpovon de la komisiono reprezentis sole ĝia estro mem. Tamen montriĝis certaj pliboniĝoj, kiuj esperigas nin, ke ankaŭ laŭ tiu vidpunkto la pliboniĝado estos daŭra. El la ĉefaj entreprenoj de SS dum la pasinta jaro ni devas citi: Alvoko al la Kongreso de la Studentaro de Malgranda Entento en Bukaresti kaj rekomendo de Esperanto kiel helpa lingvo, komune kun Esperantista Akademia Klubo en Zagreb. Komuna laboro kun tiu ĉi klubo pri la fondigo de la Centro de Studentaj Esperanto-Organizaĵoj, kiun laboron oni daŭrigos dum la Pariza Kongreso. Korespondado: Ricevitaj 9 leteroj, forsenditaj 7.

Car Csl. Esp-o Instituto bezonis sian al ni pruntitan multobligan aparaton, ni estis devigitaj aĉeti propran novan maŝinon. Ĝi estas ree en loĝejo de s-ro Slavík, kiu laboras per ĝi kaj faris ĉiujn de ni eldonitajn cirkulerojn. Krom tio li kopiadis kaj dissendadis gravajn leterojn (al ministerioj kaj aliaj aŭtoritatoj). Pro tiu daŭra kunlaborado meritus s-ro Slavík specialan dankon. La asocia skribmaŝino estas ĉe komitatano S-ro Sustr.

Nombro de forsenditaj leteroj estas 1194. Kontraŭ nombro 380 en la antaŭa jaro tiu cifero dokumentas grandan disvolviĝon de la asociaj laboroj. Ne estas en tiu nombro enalkulataj nombroj de forsenditaj cirkuleroj, kiuj aperas en la alineo pri publikiga agado. Da presajoj ni forsendis 1195. Inter ili estas 536 konfirmiloj pri kotizoj kaj premioj membraj.

5. Ekspozicia materialo (komision-estro J. Sustr). La stato de la materialo priskribita

detale en la lasta jarraporto ne ŝanĝiĝis. Dum la pasinta jaro ĝi estis pruntita kaj ekspoziciata en taŭga elekto en Bakov n. J. kaj en Kladno. Ankaŭ Horní Lítvínov petis pri ĝi, sed ĉar la peto venis en la lasta momento la administranto de la materialo ne povis la peton plenumi parte pro la tro mallonga termino, parte pro tiama troa okupiteco profesia kaj alifunkcia.

Por la ekspozicio en Pardubice estis fabrikita geografia karto kaj tute novaj tabuloj, kiuj verŝajne restos tie en la projektata muzeo. La administranto de la ekspozicia materialo rekomendas al niaj membroj uzi ofte servojn en tiu fako, sed li denove petas, ke oni anoncu sin ĝustatempe kaj ne en la lasta momento.

6. **Korespondantoj** (dávěrníci) de la Asocio. La reto, kiun ni komencis starigi en la jaro 1930 restis ankoraŭ dum la jaro pasinta tre nekompleta. Tial ni hezitis publikigi ĝin kaj, uzas koncernan nomaron sole interne. Ĉe tiu ĉi okazo ni denove atentigas niajn amikojn pri graveco de tiu ĉi aranĝo kaj petas ilin anonci sin je tiu funkcio. Kiam la listo estos pli longa, precipe kiam ni havos korespondanton en preskaŭ ĉiu grava loko, ni publikigos la liston.

7. **Informado pri esperantistaj entreprenoj en nia lando.** La kroniko de nia movado la pasintan jaron estis pli riĉa ol en jaro 1930. Nia persista zorgado kaj klopodado povis en la rubriko enskribigi informojn pri esperantistaj okazintaĵoj sume el 44 lokoj, dume en la antaŭa jaro ni povis raportii sole pri 19 lokoj. Kvankam tio signifas grandan pliboniĝon, tamen la stato ankoraŭ ne estas kontentiga; precipe pro tio, ke ne ĉiuj informoj venis al ni senpere, sed ni estis devigitaj kolekti ilin el diversaj fontoj, ekzemple gazetaj sciigoj, hazardaj aludoj en la leteroj kaj alimaniere. Eble utilos doni tie ĉi alfabetan nomaron de lokoj, pri kiuj povis en la XIII-a jarkolekto de P. nia Bulteno raportii:

Bakov n. J., Berehovo, Bor, Bratislava, Břeclav, Brno, Česká Lípa, České Budějovice, Český Těšín, Frýdek, Holešov, Horní Jindřichov, Horní Lítvínov, Hradec Králové, Karvinná, Kladno, Kežmarok, Kolín, Komárno, Kopřivnice, Košice, Kutná Hora, Lázně Bělohrad, Liberec, Mladá Boleslav, Mnichovo Hradiště, Moravská Ostrava, Nové Zámky, Olomouc, Orlová, Pardubice, Plzeň, Praha, Prostějov, Přerov, Stonava, Tišovec, Trnava, Třebíč, Uherské Hradiště, Ústí n. L., Vítkovice, Vyškov, Židlochovice.

Kiel modela povas esti rigardata la raporto, kiun donis pri sia agado Esperantista

Klubo en Praha sur p. 73. Ĝi estas detala kaj konciza samtempe.

8. **Varbado de la membroj.** Nia kasisto daŭre aplikadis la metodojn de zorga administrado de membraro kaj la sukceso montriĝinta en jaro 1930 estis daŭra. Nombro de niaj membroj kreskis en la jaro pasinta kaj daŭre kreskas malgraŭ la ekonomia krizo. Tre utilis cirkulero informanta pri la jaroj, por kiuj la kotizo estis pagita kaj nepagita; ĝia sekvo estis plena ordo en la nomaro de membroj kaj atentinda sumo el kotizoj por la malnovaj jaroj. La espero, kiun ni esprimis en nia lasta raporto, montriĝis kiel plene rajtigita. Krom la menciita cirkulero estis por varbado kaj revarbado de membroj destinita la broŝuro „Ni servas“, kiun eldonis UEA-teritorio, la aliĝilo kun ĝi sendata, kaj la cirkulero sendita al kluboj kun presita alvoko el Bulteno p. 81.

9. **Publikiga agado.** Depost la lasta ĝenerala kunveno aperis numeroj 35—40 de nia Bulteno en Progreso; entute 38 p. redaktitaj de s-ro Hromada por kiuj ni pagis al Progreso Kč 2375.—. Ni mem eldonis prese: novan (6-an) eldonon de propaganda flugfolio

Pojítko (10.000 ekz.)

luksan gvidfolion pri Praha (2000 ekz.)

ĉehlingvan aliĝilon al ĈAE (2000 ekz.)

alvokon **Ĉtenáři, ĉti a uvažuj** (100 ekz.)

alvokon **al studentoj** (500 ekz.)

kaj partoprenis en eldono de la varba broŝuro de UEA-teritoria oficejo „Ni servas“ (2450)

Ciklostilitajn cirkulerojn ni eldonis sume 16 (en antaŭa jaro 12). Sumo de la paĝoj estas 23 (en antaŭa jaro 23). El tio la Gazetara servo eldonis 7 cirkulerojn (numeroj 7—13-a). La sumo de la dissenditaj ekzempleroj estas 3810 (en la antaŭa jaro 3007). La plej granda eldoncifero de cirkulero estis 405, la plej malgranda 54. El tiuj nombroj estas videble, kian ampleksan sferon atingas niaj informoj kaj alvokoj.

10. **Kontakto kun ĉsl. oficialaj aŭtoritatoj.** Ni prezentis al ministeria prezidio memorandumon pri uzo de esp-o en eksterlanda politika propagando, en propagando turista kaj komerca, por ekligi kaj konservado de kulturaj kontaktoj kun fremdlando, uzo en poŝtaj presaĵoj, apliko por filantropiaj celoj. La memorandumon finredaktis nia vicprezidanto Dr. Pitlík.

Al pluraj ministerioj kaj al diversaj ŝtataj oficoj de dua instanco kaj al pluraj duonoficialaj korporacioj ni proponis letere niajn servojn, por kia ajn apliko kaj decido en aferoj de la internacia lingvo. Ni ricevis konfirmon pri tiuj leteroj el relative multaj gravaj oficialaj

lokoj, kio signifas same rekonon de nia organizo kiel rekonon de la movado mem. — Ni informis ministeriojn pri rezultoj de ni akiritaj, kiuj devus ilin interesi. Precipe ni informis ministerion fremdlandan pri la raporto aperinta en la Dana ministeria Bulteno koncerne uzon de la Dana filmo en Ĉeĥoslovakio kaj proponis al ĝi similan aplikon de esp-o por fremdlanda propagando. Al la sama ministerio ni raportis pri Scherer-vojaĝo. La saman ministerion kaj ministerion de komerco ni informis pri eldono de la gvidfolio pri Praha. La fremdlanda ministerio mendis 200 ekz. La urbo Praha, kiun ni informis pri la sama afero, dankis nin tre varme kaj donis al ni subvencion 2000 Kč por kontribui al la dua eldono de tiu gvidfolio.

Ankaŭ personaj intervenoj ĉe publikjuraj aŭtoritatoj estis relative multaj, precipe ĉe diversaj ministerioj, Faris ilin Ginz, Kamaryt, Koutek, Pitlík. — Fervoja ministerio sendadis dum la tuta jaro siajn esperantlingvajn korespondadojn por traduki al nia vicprezidanto dr. Pitlík tute oficiale per ministerio komerca. — Al banloka direkcio en Karlovy Vary ni gratulis pro eldono de esperantlingva prospekto. — En listo de okazintaĵoj por fremdulaj en CSR, eldonaĵo de ministerio komerca, estas laŭ nia lastjaro informo pri nia kvina kongreso en Olomouc.

11. Kontakto kun nia centra organizo. Ni daŭre estas membroj de Konstanta Re prezentantaro de Naciaj Societoj; ĉar nombro de niaj membroj kreskis, ni pagis ankaŭ pli signifan kotizon responde al la nombro. En februaro 1932 ni pagis al K. R. kotizon por 413 membroj laŭ nombro de kotizoj enkasigitaj de ni dum 1931. — En kunvenoj de K. R. kaj de la Generala estraro en Kraków prezentis nin niaj prezidanto kaj viceprezidanto; krom ili ĉeestis la kongreson ankoraŭ nia komitatano s-ro Kudela kaj ano de nia kontrola komisiono s-ro Heikenwälder.

Kun Internacia Centra Komitato de Esperanto-Movado ni estis en daŭra korespondado informante ĝin pri ĉio, kio ĝin povus interesi el faritaj kaj farotaj entreprenoj propagandaj kaj organizaj. Ni ricevis de ĝi informojn ofte tre valorajn kaj instigojn al farotaĵoj, kiujn ni ne estus entreprenintaj sen ĝi. Precipe ni ŝuldas al ICK dankon pro informoj kaj sugestoj en fako de lernejoj, poŝtaj presaĵoj, fervojoj, radio-aferoj, gazetara servo. Plurfoje ni kompreneble korespondis ankaŭ kun ĝiaj komisionoj (por radio kaj gazetaro) senpere.

Ni ĝojas povi konstati, ke ne sole ni estis kontentaj kun funkciado de ICK, sed ankaŭ ĝi kun

ni, kiel montras publikaj laŭdoj, kiujn ĝi donis al nia varba numero de Bulteno kaj al nia lasta jarraporto pri asocia agado. La kliŝaĵo de la letero de la registaro de Liechtenstein (sur p. 26 de P.) estis represita en la Kongresa raporto de ICK. Ni ankaŭ dankas al ĝi publike pro helpo, kiun ĝi donis al ni en klopodo pri organiza ordo en nia lando. — Personaj interparoloj de niaj komitatanoj Hromada, Ginz, Kamaryt, Pitlík, Skleněka dum vizito de direktoroj de ICK kaj UEA en Praha, Hradec Král., Lázně Bělohrad kaj dum la Krakova kongreso multon helpis por firmiĝo de amikaj rilatoj reciprokaj.

Pri la „reorganiza problemoj“ studis nia prezidanto kaj aliaj komitatanoj publikigitajn projektojn kaj kritikojn. Eksiĝinta nederlanda ĉefdelegito akre kritikis UEA-oficejon kaj oficejon, s-ro Baghy en „Publika letero pri reorganizo“ tre akre kritikis ICK-funkciadon. Ni opinias, ke ambaŭ malpravas grandparte. Precipe strange efikas je ni aserto de Baghy, ke la naciaj societoj estas en „krizo“, ĉar mankas al ili taskoj kaj celoj de agado. Nia sperto pri nia Asocio estas tute kontraŭa. Ni daŭre ne sole trovas multajn taskojn kaj ni ilin efektive plenumas iom post iom, sed ni per nia persista laboro fakte helpas al disvolvo kaj plifirmiĝo de la movado en nia lando kaj per tio ankaŭ en ceteraj landoj. Ankaŭ ĉe aliaj naciaj societoj oni vidas vigran kaj utilan laboron. Tamen ja preskaŭ ĉiuj rezultoj, pri kiuj raportas la „Internacia gazetara servo“ estas ŝuldataj al organiza kaj iniciatema laboro de la naciaj societoj.

Certe ĉie en la mondo ekzistas en nia movado apartiĝemaj unuopuloj, kiuj preferas labori ekster la organizo; ili akirinte ian ajn rezulton plej ofte tre brue fanfaronas pri ĝi, kvazaŭ ĝi estus frukto ekskluzive de ilia personeco kaj tute forgesas, ke jam la sola eblo ekstrakti pri tia iniciato devenas el ekzisto kaj daŭra funkciado de ilia landa organizo. Certe ankaŭ rezultoj ricevitaj de tiuj apartiĝemaj karakteroj estas valoraj, sed aŭtoroj de ili devus memori, ke ekzisto de la regula, oficiala organizo estis la praktikiĝo de ĉiuj iliaj sukcesoj. Nia prezidanto raportos en la kongreso en Olomouc pri tiuj ĉi faktoj kaj proponos rezolucion por apogi la nunan bazon de organizo.

12. Kontakto kun la ceteraj naciaj societoj ne estis tiom vigla, kiom estus utile. Kun GEL kompreneble ni rilatis ofte koresponde kaj per persona diskuto de la komitatanoj, precipe de ĝia prezidanto ing. Scholze kaj nia generala sekretario s-ro Ginz. En Pardubice kunvenis komitatanoj de CAE kaj GEL en aparta kunveno

por prilakti tiamaĵojn. Ni aranĝis la propagandan semajnon laŭ la sama plano kaj en la sama tempo. Same la Scherer-vojaĝo okazis kun ambaŭparta kunlaboro. Ni interkonsentis sendadi al si reciproke ĉiujn cirkulerojn. La preparoj por la nacia kongreso en Olomouc estas farataj en same amika interkonsento. — El la alilandaj societoj ni ricevis dankon de la Dana societo pro bona uzo de la Dana filmo. Cetere ni ricevis nur diversajn invitilojn kaj presaĵojn.

13. **Lernejaj aferoj** (komision-estro dr. Kamaryt). Ni dediĉis plenan atenton al la ministeria reforma komisiono por la burĝaj lernejoj, pri kies projektata instruplano ni parolis en la lasta raporto, ĉar la enmeto de esp-o en la planon estis diversloke kritikata. Ĉiuj anoj de la komisiono ricevis de ni detalan leteron kun materialo, la komisiona prezidanto ricevis krom leteroj de dr. Kamaryt leteron de ICK el Genevo kaj estis vizitita de kunlaborantino de la Pedagogia instituto de geneva universitato s-ino Ith. Ĉe fina balotado de la komisiono estis decidite per plimulto lasi esp-on en la plano kiel nedevigan fakon. Tio estas rezulto tre ĝojiga; sed ni ne rajtas forgesi, ke ĝis nun nedefinitiva. — La traktado pri la interŝtata akordo ne ĉesis, sed ne progresas. Certe la nuna momento tiom okupas la diplomatojn, ke oni malfacile turnos ilian atenton al tia afero.

Ĉar en la definitiva instruplano por komercaj akademioj, publikigita en majo 1931, esp-o estis forigita, ni uzis la kunvenon en Pardubice por sendi el ĝi proteston al lerneja ministerio kaj protestis per petskribo en julio. Ni klopodis, ke en tiu ĉi jaro pluraj akademioj uzu la eblecon de la malnova plano kaj instruu esp-on. Tiurilate ni sukcesis relative bone, ĉar oni efektive instruas en 3 ĉeĥoslovakaj kaj unu germana akademioj. En tiu fakto ni vidas pruvon pri intereso kaj volo de studentoj lerni; ni atenfis pri tio la ministerion per aparta petskribo en februaro. — Permeso instrui esp-on en mezaj kaj burĝaj lernejoj estis pasintan jaron uzita relative malofte, sed ŝajnas nun pli da intereso ol en jaro antaŭa.

En januaro 1932 la lerneja ministerio dissendis por prijuĝo al interesataj korporacioj reforman instruplanon de la mezaj lernejoj elirintan el laboroj de reforma komisiono por mezaj lernejoj (prez. prof. Bydžovský). Ĉar en ĝi mankas esp-o, ni furnis nin al ministerio per protesta petskribo turnante ĝian atenton al vico de niaj memorandumoj, el kiuj la unua estis sendita al ministerio jam en majo 1920.

Por instigi la instruistojn lasi sin ekzameni pri

esp-o ĉe la ŝtataj ekzamenaj komisionoj ni fondis antaŭ kelkaj jaroj Ekzamenan fondacion, por parte rekompensi al la ekzamenatoj elspezojn de la vojaĝo. En la pasinta jaro estis donita subvencio al du instruistoj.

Ĉiuj tiuj klopodoj kaŭzis bezonon de diversaj intervenoj personaj en ministerio kaj ĉe aliaj lernejaj aŭtoritatoj, kiujn faris la komision-estro. Ekzamenaj komisionoj por burĝaj kaj popolaj lernejoj estis en j. 1931 ree de la ministerio nomitaj, eĉ aliĝis unu plua. Tiu detalo estas grava kiel simptomo, ke la decidanta aŭtoritato ne volas forigi tiun ĉi institucion.

14. **Propagando ĝenerala.** Ni povas kontente raporti, ke la pasintan jaron ni sukcese provis organizi ankaŭ propagandon ĝeneralan. — Ni organizis en interkonsento kun GEL en komenco de oktobro propagandan semajnon, kiu vekis aktivecon de samideanoj en lokoj, el kiuj ni jam delonge ne estis aŭdintaj raporteton. — Per speciala cirkulero ni denove proponis al kluboj uzon de la propagandilo Pojítko, kaj proponis ĝin sub kondiĉoj facile plenumebaj senpage. Entute ni dissendis donace kaj pagate 3.340 ekz. La nombro ne estas alta; ne estas eble ne ripeti la demandon jam plurfoje diritan de ni: Per kio propagandistoj, ofte tre bruaĵ, propagandas?

Ni komencis sisteme kolekti adresojn de interesatoj kaj interesitoj pri esperanto por povi sendi laŭ tiuj adresoj almenaŭ unufoje dum jaro esperantan aŭ varban presaĵon; tio ŝajnas al ni tre grava, kaj jam nun vidiĝas rezultatoj. Ankaŭ Esperanto -Tago en Pardubice (27.-28.-VI. 1931) apartenas en tiun ĉi alineon. Kunvenis tie pli ol 80 samideanoj por manifesti pri viveco de nia movado okaze de la granda ekspozicio. La celo estis sendube atingita. Kvar niaj oratoroj parolis antaŭ reprezentantoj urbaj kaj aŭtoritatoj, kaj certe la efiko al la neesperantista publiko estis tre bona. Ankaŭ la ekspozicia stando montranta aplikon de esp-o por turisma kaj nacia propagando de nia ŝtato bone efikis. La samideanoj, kiuj obeis nian inviton kaj venis al la Tago meritas dankon de ni ĉiuj; ilia nombro per si mem dokumentas konscion pri la esperantista disciplino. Sola makuleto sur la bildo estas, ke la Tagon partoprenis treege malmultaj samideanoj el Pardubice mem. Despli grandan dankon meritas la ambaŭ aranĝantoj el Pardubice: f-ino Micháľková kaj s-ro Lavička.

Ankaŭ al iniciatemo individua ni helpadis plenumante la petojn de unuopuloj pri senpaga sendo de propaganda materialo. Enskribitaj estas 10 tiaj sendaĵoj, sed estis pli da ili.

15. **Propagando per gazetoj** estis daŭre kaj tre sukcese organizata de nia Gazetara servo (estro O. Ginz). La rezultato estas eksterordinare ĝojiga. La gazetara servo dissendis 7 cirkulerojn kun sume 48 artikoloj. La cirkuleroj estis sendataj al 300—325 kunlaborantoj. Krome la Servo liveras semajne materialon al 13 ĵurnaloj en Praha. Konstato, kio estis publikigita, ne estas facila, ĉar la Eltranĉaĵa oficejo ne liveras ĉion kaj la kunlaborantoj ne zorgas tro pri sendo de la dokumentoj. Tial ni denove petas ĉiujn niajn amikojn, ke ili sendu al ni ĉiun ajn artikolon, kiun ili vidis en iu ajn ĉeĥoslovaka gazeto.

16. **Propagando en fakaj rondoj.** Ni korespondis kun Rotary-Amikaro en Paris pri la Rotary-kongreso en Wien kaj traktis kun kelkaj Rotary-anoj nialandaj pri ilia sinteno al propono pri esperanto kiel helpa lingvo. Laŭ peto de ICK ni donacis por propagando dum la kongreso 80 ĉeĥajn ŝlosilojn. — Ni atentis la agadon inter skoltoj daŭre, ĝen. sekretario Ginz traktis plurfoje kun la vicprezidanto de la Ĉeĥoslovaka Skolta Asocio; fine ni sukcesis trovi tre taŭgan kunlaboranton en tiu ĉi sfero s-ron A. Csáder en Bratislava, kaj ni esperas, ke nun la afero ne plu ekdormos. — Kun aranĝantoj de kongreso de Internacia Transportista Federacio, kiu okazos en Praha someron 1932 ni estas en kontakto, precipe kun ilia reprezentanto samideano J. Pech en Plzeň. — Komercaj ĉambroj en Ĉeĥoslovakio kolektas laŭ peto de la alĝeria komerca ĉambro informojn pri disvastigo de esp-o ĉe ni. Ne ĉiuj faras tion kun sama fervoro; iam estis bezono de nia instigo. Ĝis nun petis kaj ricevis tiujn datojn de ni aŭ de lokaj grupoj komercaj ĉambroj en Praha, Liberec, Plzeň, Hradec Králové. — Konsilantaro de etikaj asocio en Ĉeĥoslovakio petis, ke ni aliĝu al ĝi. Ni tion plenumis kaj pagis kotizon 1931. — En instruistaj kaj porinfanaj gazetoj aperas relative tre multaj informoj pri esperanto, precipe dank' al f-ino Šupichová. — Pri laboro inter studentoj zorgas nia sekcio.

La konata rozkulturisto J. Böhm en Blatná nomigis novan specon de rozo de li kulturitan „Esperanto“. Ni zorgis pri laŭeble plej granda publikeco de tiu ĉi propaganda fakto en gazetaro nacilingva kaj esperanta en Ĉeĥoslovakio kaj en eksterlando. — Kun Laborista ligo esp-ista en ĈSR ni plurfoje kontaktis skribe kaj persone. La Sokola kongreso eldonis broŝuron propagandan en esp-o. Ni diskonigas la fakton tre intense por ke venu multaj petoj pri ĝi, kompreneble el fremdlando, ne el nia lando.

17. **Propagando fremdlanden.** Al Internacia instituto por artedukado Kanagauo (Japanujo) sendis laŭ ĝia peto al ni adresita taŭgan materialon komitatano Sustr. — Al Instituto por pedagogio ĉe ĉiuj nacioj en Mainz ni donacis kvar presaĵojn. — Nia gazetara servo komencis novan diskonigadon pri la dua eldono de poŝtkartoj de Lihtensteino. — Ni disvastigis en ĉsl. gazetoj laŭ peto de la Komitato de la Sta Antonio-jubileo en Padova informon pri la festoj. — Ankaŭ tiun ĉi jaron aperigis niaj pluraj membroj ĉeĥajn tradukojn el esperanto; kelkaj el ili estas enskribitaj en la rubriko Ĉsl. gazetaro kaj esp-o — Sed ankaŭ tiun ĉi jaron ni devas esprimi miron, ke samideanoj el koncernaj landoj neniel nin informas, kiel efikas ĉe ili sciigo pri tia uzo de esperanto. Al ni ŝajnas, ke uzo de tia fakto povas esti tre efika propagandilo precipe en la literaturistaj rondoj.

18. **Scherer vojaĝo.** Ĝi meritas apartan alineon kiel ĝin meritis en la antaŭa jaro la Dana filmo. Krom la sekretario, kiu ĝin organizis, meritas dankon ankaŭ multnombraj kunlaborantoj en diversaj lokoj. La signifo de la vojaĝo, pri kiu detala raporto estas sur p. 110 ne estas sole en tio, ke proksimume dek mil homoj aŭdis esperanton aŭ pri esperanto dum unusola monato, sed ankaŭ en plivigliĝo de movado en diversaj lokoj, ĉar la prelego sukcesis kunveni ankaŭ tiujn samideanojn, kiuj malofte sin revidas. Ni esperas, ke ankaŭ la konvinkaj argumentoj por bezono de organizo kaj disciplino, kiujn s-ro Scherer diris en multaj lokoj, alportos rezultojn. Restas sen la dubo, ke la paroladoj havis ĉie plej bonan efikon. En iuj lokoj ĝi estis jam konstatita, en aliaj ni konvinkigos pri ĝi certe post tempo pli aŭ malpli frua. ICK dankis al nia ĝen. sekretario s-ro Ginz per letero publikigita sur p. 111 de P.

19. **Gramofon-diskoj.** La surkanto de la himno sur diskon de la Bakule-horo signifas per si mem gravan faron. Ni propagandis la disvendon de la diskaj kaj konvinkigis pri kontenteco de Bakule-instituto. Ankaŭ pri disvendado de la disko de KEU kaj de disko kun Zamenhofa voĉo ni zorgis kun rezultato.

20. **Radio.** (Komision-estro s-ro O. Ginz.) — Grava rezultato akirita de la komisionestro estas dekreto de la poŝtministro konfirmanta permeson uzi esp-on por mallongonda dissendo (publikigita sur p. 96). Nun estas tasko de samideanoj radio-amatoroj efektive uzi la permeson. Nia membro s-ro Macháň en Slezská Ostrava faris — kiel unua esperantisto en nia ŝtato — sukcesan ŝtatan ekzamenon pri la

amatoraj radio-sendoj kaj posedas propran mallongondan sendilon OK 2 MA.

Interese estas, ke dum jaro 1931 kvar ĉsl. stacioj disaŭdigis prelegojn esperantlingvajn: Bratislava 2 foje (Wanitsek), Košice (Scherer), Moravská Ostrava (Křetínský), Praha (Giralt) unufoje. Krom tio disaŭdigis Praha je la Zamenhofa tago la esperantan himno el Bakulea disko samtempe al ĉiuj ĉsl. stacioj. Dankon meritas multaj samideanoj fremdlandaj kaj enlandaj, kiuj aŭskultis tiujn disaŭdigojn, kaj skribis al la sendstacioj aprobajn leterojn.

21. **Turismo** (komisionestro dr. Pitlík). Ni eldonis sub aŭspicioj de UEA luksan gvidfolion pri Praha. Ni uzis por tio 2.000 Kč, kiun ni ricevis donace de komitato por la postkongresa karavano el Budapeŝt, la ceteron ni pagis el nia kuranta mono. La tekston tre bonan liveris s-ro Bouška. Kiam oni ne sukcesis disdonigi ĝin en Krakova kongreso pro malfaciligadoj de la polaj doganaj oficoj, ni disdonadis ĝin al diversaj fremdlandaj interesatoj. Precipe menciinda estas dissendo de tiu ĉi turista varbilo al 107 tre prudente elektitaj adresoj fremdlandaj. — Ni zorgis pri havigo de fervojaj rabatoj por kongresanoj en Krakovo kaj en Parizo kaj por Bulgara karavano el Krakovo. Krom petskriboj estis bezonaj ankaŭ personaj intervenoj farataj de s-ro Ginz. Por la Krakova kongreso ni subskribis la petskribon kun la E. Katolika ligo. En ĉiuj tri okazoj la rabatoj estis donitaj.

Internacia libertempejo en Lázně Bělohrad tre bone sukcesis. La raporto pri ĝi estas sur p. 96. — Dr. Pitlík tradukis esperanten tekstojn por la poŝtkartoj kun bildoj pri folkloro eldonotajn de la fervoja ministerio. — Ni donis ripete informojn turismajn al eksterlandaj interesigantoj kaj niaj komitatanoj servis ofte la alvenintajn gastojn. —

22. **Literaturaj aferoj** (komisionestro Hromada). La preparaj laboroj por la Ĉeĥoslovaka Antologio progresas, se ne rapide, tamen fakte. Dekunu samideanoj sendis al ni aŭ liston de siaj tradukoj aŭ liston de laboroj tradukotaj aŭ ĝeneralajn konsilojn tre utilajn. Ankaŭ bonaj tradukoj jam presitaj en diversaj gazetoj estas nun kopiataj por havi inter la manuskriptoj plej multon por elekti. — Ni gratulis al Devjatin ĉe lia 70-a naskiĝtago.

23. **Sciencaj aferoj** (komisionestro Kamaryt). Al Ĉsl. elektroteknikista asocio sendis proponon pri uzo de esperanto en internaciaj luminaj kongresoj, laŭ iniciato de japanaj elektroteknikistoj, Ing. Novák, el kio sekvis interesa kaj por nia movado favora korespondado. — Kun pluraj universitataj profesoroj, kiuj publike faris

favorajn menciojn pri lingvo Internacia, korespondis dr. Kamaryt. — Plurfoje legis niaj komitatanoj manuskriptojn de verkoj por konsili kaj korekti. Plej ampleksa estas tiurilate laŭlingva esploro farita de s-ro Hromada en grava presota manuskripto. — Pedagogia instituto de la ĝeneva universitato transdonis al niaj anoj Šupichová kaj Kamaryt kontrolon pri apliko de testoj. Ni disponigas al ili niajn aranĝojn por tiu celo. — Ni daŭre funkciis kiel kolektantoj de kotizoj por Int. Scienca Asocio.

Praha la 25-an de februaro 1932.

Komitato de ĈAE

Dr. STAN. KAMARYT,
prezidanto,

OTTO GINZ,
ĝenerala sekretario.

FINANCA RAPORTO PRI 1931.

XII. administra jaro de ĈAE.

Ferma bilanco:

	Aktivoj Kč	Pasivoj Kč
Mono en la kaso	284,15	
Mono en la Poŝta Sparkaso Praha	647,15	
Mono en Zálložna Peněžního úřednictva	5.657,50	
Inventario (post 10 proc. amortizo)	1.800,—	
Disvendotaĵoj	691,65	
Diversaj Debitoroj-Kreditoroj	3.931,25	3.390,45
Kotizoj pagitaj dum 1930, 1931 por 1932		1.588,—
Transítivo: 9/10 de la imposta ekvivalento	256,80	
Asocia Kapitalo		8.290,05
	<u>13.268,50</u>	<u>13.268,50</u>

Bilanca Perdo-Gajno:

Membraĵ kotizoj		5.824,—
Membraĵ kotizoj - Studenta Sekcio		84,—
Elspezoj de administrado	2.577,75	
Elspezoj de propagando	6.540,85	
Diversaj entreprenoj		3.487,70
Disvenditaĵoj		50,45
Administrataj elspezoj de la Studenta Sekcio	33,75	
Diversaj elspezoj kaj enspezoj	219,—	405,75
	<u>9.371,35</u>	<u>9.851,90</u>
Jara profito	480,55	
	<u>9.851,90</u>	<u>9.851,90</u>

Asocia Kapitalo:

Stato la 1-an de Januaro 1931	Kĉ 7.809,50
Jara profito	Kĉ 480,55
Stato la 31-an de Decembro 1931	<u>Kĉ 8.290,05</u>

Nombro de kasaj dokumentoj: 282

Kasa spezo: Kĉ 109.501,50 (unuobla!)

Hradec Králové, la 31-an de Decembro 1931,

Otto Sklenčka
kasisto.

Administrado de la membroj.

Se ekz. UEA faras statistikon pri la membroj, ĝi kalkulas sole tiujn, kiuj pagis por la kuranta jaro. Ne tiel severaj ni estu en ĈAE statistikante niajn membrojn, el kiuj multaj ne ankoraŭ alkuŝmigiĝis sin al la dezirata administra ordo. Se mi diros, ke ĈAE havas en la fina de 1931

365 aktivajn membrojn,

tio signifas, ke 365 personoj pagis por 1930 aŭ por 1931 aŭ por ambaŭ jaroj. Kiu ne pagis por iu el la jaroj 1930-31, tiu ne estas kalkulata:

Por la jaro 1930 pagis dumvivaj	228 membroj <u>3 membroj</u>
Stato en la fino de 1930	<u>231 membroj</u>
El ili pagis ankaŭ por 1931	188 membroj
Novaj membroj, kiuj ne pagis por 1930	<u>134 membroj</u>
Por 1931 pagis entute	<u>322 membroj</u>
Por 1930 pagis, por 1931 ŝuldas	<u>43 membroj</u>
	<u>365 membroj</u>

Por la jaro 1931 pagis jam en la jaro 1930 membroj 117, por la jaro 1931 pagis en la jaro 1931 membroj 202; al tio 3 dumvivaj membroj: faras 322 pagintaj membroj.

Stato fina 1930	231
Stato fina 1931	<u>322</u>
Diferenco	<u>91</u>

tio estas kresko 40%.

MEMBRA KOTIZO DE ĈAE

Kĉ 16.—.

(subtenantoj Kĉ 50.—, dumvivaj Kĉ 500.—).

Sendu aliĝan poŝtkarton

al *Otto Sklenčka*, kasisto de ĈAE, Hradec Král. 628a

Ceteran korespondaĵon por ĈAE adresu al

Otto Ginz, ĝen. sekr. de ĈAE, Praha II. Stárkova 4.

Laŭloka divido de la membroj

- 82 en Praha,
- 25 en Košice,
- 15 en Hradec Králové,
- 16 po 8 en Pardubice kaj Brno,
- 14 po 7 en Bratislava kaj Olomouc,
- 5 en Vyškov,
- 20 po 4 en Červený Kostelec, Holešov, Lazy, Orlová, Přerov,
- 12 po 3 en Bystřice p. Hostýnem, Jaroměř, Kladrno, Nymburk,
- 34 o 2 en Dolní Kounice, Jičín, Kolín, Lázně Bělohrad, Liberec, Nové Zámky, Prostějov, Pelhřimov, Plzeň, Rumburk, Slezská Ostrava, Slavkov, Soběslav, Stará Paka, Tábor, Trnava, Železný Brod.
- 141 po 1 en 141 malsamaj lokoj de nia lando
- 1 en Budapeŝt.
- 365 aktivaj membroj.

Otto Sklenčka.

MOVADO EN ĈSR.

Publika diskutado pri E. antaŭ 200 p.

Tiu publika diskutado, da kiuj ni ne havis multe ĝis nun, okazis la 21. Februaro en Karvinná. Ĉeestis ĝin 200 p., aranĝis, kiel ni jam skribis (p. 109) du neŭtralaj kultursocietoj: la pola kleriga komisiono kaj la memeduka rondeto ĉe la pola Lerneja Societo Macierz Szkolna. Prezidis distrikta lerneja inspektoro P. Rakus (neesperantisto), ĝenerala raportanto estis R. Z. Kobiela, oficisto de la pola konsulejo. Unue parolis J. Wałeczko, redaktoro de la pola gazeto „Právo Ludu“ el Český Těšín (neesperantisto), kiu prezentis laŭ sia vidpunkto la problemon de lingvo internacia, deklarante ke esp-o estas la plej taŭga solvo. Poste pastro K. Maultz atentigis, ke la latina lingvo ne kapablas esprimi ĉiujn modernajn ideojn kaj tial esp-o estas preferinda. Parolis ankaŭ (pollingve) s-ano Poncza, s-ro Hladký (ĉeĥe) en la nomo de ĈAE kaj s-ro Kryšťa. Sekvis libera diskuto. Ĉiuj parolantoj, reprezentantoj de diversaj partioj kaj de tri nacioj konsentas tamen en unu punkto: ke esperanto estas konsiderata plej bona solvo de de la problemo. Tion esprimas ankaŭ la akceptita rezolucio, kiu krome adresas al ĉiuj lernejoj aŭtoritatoj kaj lernejestroj la peton, ke ili en la kadro de la nunaj lernejoj leĝoj akcelu

la enkondukon de esp-o kiel nedevida fako de instruado. rzk.

Csl. Esperanta Instituto en Praha. Ĝenerala kunveno okazis 20.-an de februaro 1932. Estis elektitaj: prezidanto Dr. Augustin Pitlík vicprezidanto Václav Čánský, ĝen. sekretario, dr. F. J. Havelka, sekretario B. Kubičková, kassistino Klema Hlaváčová, administranto de domo Frant. Hájek. Anstataŭantoj: Karel Procházka, A. Paukert. Revizoroj: Sidonie Dlouhá, Frant. Dejmek; anstataŭanto B. Weiner. Adreso de Instituto estas Praha II., Křemencová 17.

Praha. Esperantista Klubo de Praha aranĝis dimanĉe la 28. Februaro sian 30-an jarkunvenon en kafejo Louvre. Partoprenis 34 p. La prezentitaj raportoj de la funkcioj estis danke akceptitaj. La klubo havis en la pasinta jaro 116 membrojn, okazigis 56 kunvenojn (vidu diversajn raportojn en „Movado en ĈSR“), el kiuj multaj kun speciala programo krom la kutimaj informaj kaj konversaciaj. Estis aranĝitaj du kursoj por komencantoj kaj unu por progresintoj, parolado de S-ro Frey el Wien pri Aŭstrio, parolado de S-ro Scherer, partopreno ĉe Dana filmo, k. m. a. La klubo biblioteko enhavas 1300 verkojn. Estis reelektitaj: kiel prez. S-ro Sustr, kiel vicprez. S-ro Staněk Fr., kiel kas. S-ino Herzigová, protokol. F-ino Tarantíková, revuisto F-ino Rabi, bibl. S-ro Staněk M. Kiel novan sekretario la kunveno elektis S-ron Kleprlík. Aliaj komitatoj: Boháč, Janda Bárach, Votrubeč. Estis akceptita serio da liberaj proponoj venintaj precipe de S-ro Weisskopf kaj Staněk. La decido de la kunveno pri Asocio kaj firmo Neŭtrala centro ni publikigas sub: Por Asocio, sur paĝo 34. mm

Praha. La urba konsilantaro de Smíchov pruntis al Sporta Poŝtista Klubo de Praha 55 ejon por esp. kursoj en la burĝa lernejo, strato Smetanova. La kurso komencas la 8. Marto kaj jam nun aliĝis 27 personoj. Instuas S-ro poŝta sekretario Votrubeč.

Nymburk. En la ĝenerala kunveno de nia klubo okazinta la 7. Februaro 1932 en hotelo „Slavia“ estis elektitaj: prez. J. Klůz, vicprez. Emil Tyl, sekr. Josef Buka, kas. S-ino Pavlíková R., plie Pavlík Jar., Havránková J., kaj Janoušek J. — Kurson por komencantoj gvidis S-ro Buka. Komencis 12 personoj, finis 7 p. kaj ĉiuj aliĝis al nia klubo.

Mnichovo Hradiště. Esperanto-Klubo aranĝis la 15. Februaro 1932 poŝtkarto- kaj leter-vesperon, al kiu venis 30 salutoj el 20 landoj. Partoprenis gastoj el Jos. Důl, Liberec kaj Bakov n. J., entute 25 p. Korespondemuloj elektis por si

konvenajn korespondantojn. F-ino Švermová ludis plane la himnojn. — Samtempe okazis jara ĉefkunveno, kiu elektis novan estraron: Prez.: St. Malý, instruisto; Vicprez. F-ino M. Grindlová; sekr. Jos. Grindl, komercisto; kas. J. Kreibich, inĝeniero. El la vigla laboro dum 1931 ni citas: aranĝon de 2 kursoj kaj 5 ekskursoj al proksima „Ĉeĥa paradizo“, partoprenon ĉe prezentado de la filmo „Bela Danujo“ kaj gastigon de tri svedaj esperantistoj. pf.

Uherský Ostroh. Sub protektorato de la Reĝiona porkultura societo okazas tie de la 5. Januaro 1932 progresiga kurso por 17 p. Gvidas ĝin S-ro Dolfa Bartošík, instruisto. La kurso tre bone progresas, partoprenas ĝin plenkreskuloj, inter ili 4 instruistoj.

Uherské Hradiště. Ĉi tie S-ro instruisto Bartošík, gvidas kurson de la 14. Februaro ĉiudimanĉe antaŭtagmeze. Aranĝas ĝin Instruista unuigo Komenský por siaj membroj. Partoprenas 12 ĝeinstruistoj. La instruado okazas laŭ la Ĉeĥ-metodo kaj la ĝelernantoj trovas ĝin tre interesa. S-ro Bartošík per la dekreto de la Ĉeĥ-Instituto de la 20. Januaro estis enskribita en la liston de la personoj rajtigitaj gvidi ĉe ni Ĉeĥ-metodajn kursojn. — La estraro de la instruista unuigo decidis aranĝi aŭtune esp. ekspozicion kaj post ĝi publikan Ĉe-metodan kurson.

La 9. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis marde la 1. Marto 1932 en Praha, kafejo Louvre Ĉeestis S-roj Brambora, Ĝinz, S-ino Herzigová, S-roj Janda, Dro Pitlík, Sedláček, Slavík, Staněk Fr., Sustr, F-ino Tarantíková, S-ro Votrubeč. Senkulpigis sin S-ro Hromada (malsano en la familio). — Prezidis D-ro Pitlík, protokolis F-ino Tarantíková. — Daŭro de 20.30 ĝis 23-a horo.

El la protokolo ni publikigas:

Esperanto-surskriboj ĉe transportaj entreprenoj.

Fervoja inspektoro J. Blažek en Olomouc sendi detalan kaj vastan memorandumon pri tiu afero. En ĝia senco ĈAE intervenos.

Kongreso Olomouc.

Pri la detaloj de la programo traktas kun LKK Olomouc nia prezidanto mem. La ĝen. sekretario traktas pri aranĝo de speciala vagonaro el Praha al Olomouc. Pri detaloj ni ankoraŭ informos, sed ĉiukaze la rabato de la veturprezo estos pli ol 33%. Oni povos ankaŭ partopreni la aranĝon pri loĝado kaj manĝado, kio donos al la kongresanoj pliajn faciligojn.

Lingva problemo estas tutkolora artikolo de Pokorný en *Litoměřické listy* 16. I. Ĝi parolas plej objektivie pri la memkomprenebla rajto de ĉeĥoj kaj germanoj ĉeĥoslovakiaj uzi sian lingvon ĝepatran kaj pri la malfacilaĵoj devenantaj de la diverslingveco. Ĝi konkludas, ke helpo estas serĉota en ĝenerala uzo de esperanto.

Slaviĉko, dimanĉa aldono por infanoj de České Slovo havas regule en ĉiu numero Esperantan angulon de J. Šupichová. La enhavo post fino de la gramatiko estas nun facilaj artikoloj esperantlingvaj kaj ĉeĥaj sciigoj pri novaĵoj el la movado.

Stráž Třebíč 21. I.: Franca prezidanto kaj esperanto. Interesa noto laŭ *Le Matin* pri interparolo de Doumer kun la prezidanto de pariza komerca ĉambro.

Bohumil Dospíšil parolas la 28. XII. en **Právo lidu** pri siaj spertoj en Japanio. Nin interesas precipe la alineo, en kiu li rakontas simile al ICK-Delegito Scherer pri siaj paroladoj kaj la multaj invitoj, kiujn li ricevis de la esperantaj kluboj japanaj eksciintaj pri lia posedo de esperanto. Ankaŭ al japanaj lernantoj li parolis, sed ne sufiĉis lia tempo por akcepti ĉiujn invitojn.

Kio estas nova en Rusio. Laŭ esperanta korespondado de Fr. Pytloun en *Mladoboleslavské listy* 30. I.

Ĉekoslovenský denník, Olomouc informas la 29. I., ke la verko Lázeňský film (Banloka filmo) de Vlad. M. Strojil, tradukita jam en lingvon serbokroatan, aperos ankaŭ en esperanto.

Dr. M. Stádník estas sinjoro, kiu ŝajne ne partoprenis ankoraŭ iun internacian kongreson, ĉar li skribas en **Přítomnost** 13. I. parolante pri la Senarmiga konferenco: „...Kiu sidis ĉe unu tablo kun hindo, germano, anglo, franco ktp., konfirmos, kiel malfacile estas interkonsentiĝi. Manko de komuna lingvo ne malhelpas. Malhelpanta estas la psikologia nuancigo laŭ nacia karaktero. Esperanto estas superfluaĵo...“ — Spertuloj parolas alimaniere.

Ĝenerala opinio estas, ke ne ekzistas plu io, kio sin nomis Esperantido. Anonco en **Klatovské listy** 6. II. pruvas, ke estas eĉ ia „movado esperantida“, en nia ŝtato, kiu organizis la 13. II en Klatovy „komitatata konferencu“ (komitatatan konferencon). Subskribita estas —zný. Do s-ro pastro **Železný** konferencis. Sed kun kiu?

Kvankam venas en niajn manojn nur eta parto de la aperintaĵoj, restas ne menciita ankoraŭ amasego da plej diversaj artikoloj pliaj, grandaj kaj malgrandaj, el okcidento kaj el plej ekstrema oriento de la respubliko. Ni kreskas kaj kreskas intereso pri ni.

O. G.

Slovníky:

- Kühnl-Procházka**: Slovník česko-esper., váz. Jediný česko-esp. slovník, 25.000 slov 31.—
- Čánský-Riedl**: Slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho slov, i odborných 21.—
- Filip Jan**: Velký slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho odvozenin 41.—, váz. 51.—

V kursech, které chystáte, použijte... Svým známým k domácímu učení doporučujte....

UČEBNÍCI A CVIČEBNÍCI
MEZINÁRODNÍHO JAZYKA

ESPERANTO

OD PROF. DRA ANT. ŠILHY

96 stran. — Cena Kč 10/60 s portem
Při odběru aspoň 5 výtisků sleva.

Vydalo *La Progreso*, Praha VII.

Rádce českého esperantisty je brožurka odb. učitelky Julie Šupichové, která vás i vaše známé poučí formou otázek i odpovědí o vzniku esp., jeho organizaci, literatuře, učebných pomůckách, praktickém upořebení, dopisování a j. Objednejte bílono-složenkou za 2.30 Kč u Julie Šupichové Praha, č. účtu 16.879.

Obracejíte pozornost veškerého československého studentstva k článku p. řed. reál gymnasia v Brně R. Fridricha, na str. 36., zveme srdečně všechny zájemce o mezinárodní jazyk z řad studentských, aby se přihlásili k Esperantské sekci, zřízené u našeho Svazu od roku 1931. Za příspěvek Kč 6.— ročně dostávají vedle plných členských práv zdarma knižní publikace o esperantu. Pražské studentstvo upozorňujeme zvláště na to, že v letním i zimním semestru konají se na technice pravidelná cvičení v esperantu pro začátečníky i pokročilé.

MEZINÁRODNÍ JAZYK VE SLUŽBÁCH STUDENTSTVA.

Je-li vůbec některá myšlenka s to vzbuditi nadšení studující mládeže novými obzory, které otvírá lidstvu, a zaslouhuje-li přes překážky, jež se staví v cestu jejímu uskutečnění, aby mládež věnovala překonání těchto překážek zásobu energie, kterou dovede vynaložiti na všechny velké věci, je to myšlenka mezinárodního jazyka.

Vynález esperanta je schopný, aby provedl ve hmotných podmínkách sociálního života důkladnou změnu, kterou můžeme srovnati se změnami, jež byly způsobeny slavnými vynálezy; usnadněním mezinárodních styků esperanto poskytne neocenitelných výhod technikům, obchodníkům, cestujícím atd. Ba, esperanto svou vlastní hodnotou je obdivuhodným nástrojem pokroku a civilisace.

Tomuto jazyku lze se totiž tak lehcе naučiti a jím mluvíti, že je zázračným prostředkem, jak proniknouti do duší opozdilých, a tak dává každému národu neomylný a jistý prostředek k rozšíření ideí pokroku, práva, spravedlnosti a svobody.

Není snadné toto poslání, k němuž naši mládež zveme.

Je věru těžko představití si všechny překážky, jež nahromadil zvyk, tradice a lhostejnost, aby zatarasily esperantu cestu.

A přece vnukuje takovou důvěru těm, kdo předvídali jeho význam v budoucnosti lidstva, že po těch 45 let, co esperanto existuje, jeho šířitelé nepřestali bojovati, ač byli skoro bez prostředků, bez peněz a bez vlivu. Přes to však konečně dosáhli úspěchů velmi značných. Za prvé dokázali, že tento umělý jazyk přece může žiti a rozvíjeti se jako národní jazyky, a pak, že je schopen prokázati všechny služby, jichž se požaduje od mezinárodního jazyka ve všech oborech lidské činnosti.

Všeobecné přijetí esperanta by dalo studentům tyto výhody:

1. Studium cizích jazyků na středních školách by zůstalo omezeno na cíle pouze literární. Tak by se ulehčilo osnovám.

2. Učebnice a cenná vědecká nebo literární díla by se uveřejňovala v esperantu současně s původním vydáním v mateřském jazyce spisovatelově. Díla vydaná v cizině v různých jazycích byla by tak přístupnější studentům, neboť by byla nejen srozumitelnější, ale také proto, že by měla daleko větší odbyť než dnes a vydavatelé by mohli cenu snížit.

3. University by mohly pořádati pro cizince přednášky v esperantu. Jaké by to bylo povzbuzení i pro učence z malého národa, kdyby mohl přednáseti na cizích universitách a nebyl omezován v rozšíření svých myšlenek tím, že nezná náhodou některého evropského jazyka. A tak by studenti všech zemí mohli procházeti všemi universitami a nebyli by nuceni napřed dlouho studovati jazyk často nesnadný, kterého pak v životě nikdy nepoužijí.

4. Úsilí o vytvoření velikého světového svazu studentstva, které se již tak často projevilo, najde cennou oporu v užívání jednotného a jednotícího jazyka, který usnadní důvěrnější styk a úspěšnou součinnost mezi mládeží všech národů pro všechny velké ideje pokroku.

5. Po stránce praktické pak by byl pobyt cizích studentů v universitních městech neobyčejně usnadněn, kdyby se použilo jazyka, který odstraní všechny obtíže nesmluvitelnosti.

Je nutno doporučiti studentstvu studium esperanta. Naučí se mu takřka hravě a při jeho studiu bude míti pocit duševní spokojenosti.

Ti, kteří mají nadání pro vědu, budou okouzleni jeho logikou a dokonalou pravidelností, takřka matematickou formou jeho stavby. Ti pak, kteří se kloní spíše k literatuře, budou překvapeni jeho bohatostí a pružností, jež dovede vyjádřiti všechny odstíny myšlenky, zkrátka všemi těmi niternými vlastnostmi, které z něho činí skutečnou syntesu moderních jazyků národních a nástroj, který je schopný vysloviti vznešené myšlenky společné celému lidstvu.

(Napsal Rudolf Fridrich.)